

# STARO

**N-ro 1/2013 (246)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**ANKRO - Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Pisek**

La 8-an de decembro 2012

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidentino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

## Revizia komisiono de ĈEA:

**Prezidanto:** Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, la komitato.

## **Karaj kaj estimataj ĈEA-membroj kaj ceteraj legantoj,**

post unu jaro mi denove turnas min al vi resumante la pasintan jaron kaj ĉi-jarajn planojn.

Tuj komence permesu al mi danki al ĉiuj, kiuj laŭ siaj fortoj helpis al la progreso de E-movado ĉiukampe. Laŭdon meritas ne nur tiuj, kiuj aktive partoprenis en nia asocia movado, sed ankaŭ unuopuloj aŭ aliaj kluboj aŭ organizoj starantaj ekster ĈEA. Ĉio ĉi kunhelpis, ke nialande okazis sufiĉe multo – ekde kelkaj internaciaj aranĝoj ĝis eldonado de poresperantaj legaĵoj.

Kompreneble kiel ĈEA-prezidanto mi volonte vidis nian asocian laboron, kiu estas priskribita en agadraporto aperinta en la pasinta (ekde p. 105) kaj tiu ĉi (ekde p. 6) numeroj de Starto. Evidente tiuj, kiuj pretas iel engaĝiĝi, havas multajn eblecojn kaj mi persone volas inviti ĉiujn membrojn aliĝi laŭ siaj ebloj kaj ŝatokupoj.

Al ceteraj, kiuj ĉi-tempe pro diversaj kialoj povas la movadon sperti pli pasive, mi dankas ankaŭ, ĉar ja ili estas gravaj per sia preteco partopreni aranĝojn, aboni legaĵojn aŭ simple nur pagi sian kotizon en ĈEA. Mi vere kredas, ke por progresigi Esperanton tutmonde necesas havi organizon kaj opinias, ke internacie ĝi estas ĉefe UEA, kies ĉi-landa ĉenero estas ĈEA. Krome ĈEA devas i.a. deporni multajn historiaĵojn kaj zorgi pri ili, propagandi ekstere, okazigi aranĝojn kaj fari multon alian. Espereble ĈEA-membroj tion konsideras ankaŭ tre grava kaj pruvas tion per kotizpagado, ĉar ja vere ĝui Esperanton eblas sendube ankaŭ sen ĈEA, kiel pruvas multaj individuoj.

Mi memkompreneble bedaŭras, ke nia

membrobazado stagnas aŭ iom-post-iom malkreskas, sed eble mia priskribo pensigos kelkajn (re)aliĝi al ĈEA, ĉar multaj internaj projektoj vere vivas kaj ni bezonas helpon por pluiri.

Mi volonte povas informi vin, ke pasintjare nia ekonomia stato pliboniĝis je kelkdek mil kronoj. Aranĝis tion ne tro popularaj paŝoj koncerne Starto-dissendadon kaj alian ŝparadon, sed ankaŭ tre sukcesa Trilanda konferenco. Nelastvice ankaŭ granda anonima donaco de 20.000 Kč, kies aŭtoron mi dankas almenaŭ ĉi tie esperante, ke li/ŝi legas Starton.

Tamen por akiri pli fortan staton kaj ekonomian ekvilibron ne eblas suririntan vojon forlasi. Pro tio pasintjara konferenco aprobis novan kotizregularon, kies celo unuavide ne estis altigi kotizojn, sed optimumigi. Tial oni nun rajtas elekti ĉu preferi presitan Starton aŭ havi nur aliron al ties interreta versio.

Rezultojn de tre sukcesa mastrumado en la jaro 2012 kaj planoj por 2013 vi povas legi detale ĉi-numere sur p. 5.

Ni ĉiuj en la komitato kredas, ke ĉio ĉi helpas al la vojo de ekonomia ekvilibriĝo kaj ke jam nun venas ankaŭ ebleco elspezi monon en utilaj projektoj. Kiel ekzemplo povus servi programaro por skenado kaj ciferecigado, kiun la estraro aprobis aĉeti.

Kiel ni jam informis, unu persono pro problemoj ekster la movado kaj tempomanko forlasis la komitaton kaj ni trovis ĝis nun neniun posteulon. Dum la aŭtuna komitatkunsido ni iom reorganizis nian laboran disdividon por kovri bazan teritorion (bv. rigardi la paĝon 2). Bedaŭrinde necesis flankenmeti preskaŭ komplete sferon de subvenciaj projektoj kaj parte ankaŭ eksteran informadon, por kio ne plu restas fortoj.

La celo estas ne simple informi vin pri realeco, sed ankaŭ peti vin serĉi kandidaton aŭ eĉ sinproponi. Se iu konsideros la sferon de informado kaj subvencioj proksima, la posteno vakas ...

Jam nun mi volus inviti vin al ĉi-jara konferenco, kiu okazos 25.-28.10.2013 en la mezbohemia urbeto Nymburk en unu loko (tranokto, manĝo, salono). Mi firme esperas, ke ni renkontiĝos tie multnombre kaj ke komune ni pritraktos kaj evoluigos diversajn projektojn, kiuj puŝos nin plu kaj kiujn vi ĝuos kaj opinios utilaj.

Kiu povas kaj volas, tiun mi kunvokas sub komunan tegmenton realigi viajn ideojn kaj progresigi Esperanton! ĈEA ne estas nur komitato! Sukceson al via agado!

*Vladimír Dvořák*  
*ĈEA-prezidanto*

## LA 8-A SABLĀ PRINTEMPO

18.-21.4.2013

okazos denove kadre de la seminario en Skokovy en la sabloŝtona Bohemia Paradizo! La ĉefa temo estos:

### Voĉlegado kaj voĉregistrado

Ĝi taŭgos kaj por tiuj, kiuj ŝatos nur provi „eternigi“ sian voĉon, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj mem volos lerni, kiel krei son-registraĵojn pere de komputilo. Propra tekkomputiloj bonvenas, sed ne necesas. Ne mankos seminarieto pri kultivado de la voĉo, kantado, aktualaĵoj pri Esperanto en Interreto kaj projekciado de interesaj filmoj. Ekskursaj kaj amuzaj programoj okazos samtempe kun la programo de la printempa seminario. Tranokto+3manĝoj 420 CZK tage. Eblas veni ev. nur por semajnfino. Detalajn informojn kaj aliĝilon: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, CZ-397 01 Písek, tel. (+420) 774 942424, [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz).

## Klubaj jarkunvenoj

**Brno.** La 6-an de februaro 2013 ok membroj kolektiĝis en la klubejo. La kunvenon gvidis V. Podhradská. M. Malovec legis raporton pri agado en 2012, Z. Závodný ekonomian raporton kaj O. A. Fischer konstatis, ke la kontrolgrupo trovis ĉion en ordo. Post diskuto estis aprobita laborplano por 2013.



**Prostějov.** La 7-an de februaro 2013 kunvenis 9 membroj, du gastoj el Přerov kaj unu el Olomouc. La prezidanto J. Liška tralegis raporton pri la agado en 2012, s-ano Smělý informis, ke la kluba biblioteko kreskis al 851 titoloj. Kasistan raporton de s-ano Kincl legis s-anino Daničová. Revizia raporto de s-anino Kaštilová konstatis bonan ekonomion de la klubo. Nova kluba komitato: Jaroslav Liška (prezidanto), Jiří Kincl (kasisto), Milan Smělý (biblioteko), Bedřiška Kaštilová (revizio de budĝetoj), Božena Danišová (komitatanino).



Výsledek hospodaření ČES za rok 2012, plán na rok 2013  
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).

<b>Příjmy</b>	rok 2012	plán 2013	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2012	
Příspěvky na běžný rok	19 040	20 000	<b>peněžní prostředky</b>	
Příspěvky dobrovolné	14 385	15 000	pokladna korunová	335
Příspěvky na budoucí rok	24 066	25 000	postkonto	2 571
Dary členů	20 000	13 000	účet Fio	28 076
Dary nečlenů	60 240	1 000	účet Fio spořicí	149 979
Dotace	6 940	9 000	<b>peníze celkem</b>	<b>180 961</b>
Starto předplatné	464	400	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	67 114
Konference a sjezdy	152 496	130 000	<b>investice</b>	
Činnost klubů a sekcí bez PS	0	40 000	podílové listy	186 159
Muzeum	1 122	0	<b>investice celkem</b>	<b>186 159</b>
Libroservo	8 847	5 400	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	13 808
Kurzy esperanta	3 780	4 000	<b>pohledávky</b>	
Příspěvky UEA ind. běžný rok	7 820	7 000	UEA subkonto	33 064
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	20 910	20 000	faktura vydaná č. 9	148
Platby UK na běžný rok	0	3 000	<b>pohledávky celkem</b>	<b>33 212</b>
Platby UK na budoucí rok	13 830	3 000	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	-42 224
Platby ILEI a pedagog. komise	300	1 000	<b>ostatní majetek ČES</b>	
Úroky z účtů	1 233	200	vybavení muzea v ceně pořízení	141 533
<b>Příjmy celkem</b>	<b>355 472</b>	<b>297 000</b>	knihy v libroservu (odhad)	35 000
			.....	
<b>Výdaje</b>	rok 2012	plán 2013	<b>ostatní majetek ČES celkem</b>	<b>176 533</b>
Starto tisk	38 403	29 600	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	-4 150
Starto distribuce	25 315	17 800	<b>závazky</b>	
Konference a sjezdy	131 587	120 000	platby pro UEA	9 700
Činnost klubů a sekcí bez PS	8 530	40 000	platby pro UK	13 830
Administrativa, kancel. pořeby	2 135	1 500	Klub Brno	781
Jízdné funkcionáři	4 959	7 800	<b>závazky celkem</b>	<b>24 311</b>
Přísp. na stravné za schůze	650	600	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	9 337
Muzeum	13 475	15 000	<b>úcelově vázané prostředky</b>	
Libroservo nákup zboží	0	4 000	fond Tilio	27 392
Libroservo poštovné a balné	662	600	fond ediční	12 660
Kurzy esperanta	2 678	500	kluby a sekce bez právní subj.	83 746
Příspěvky UEA ind. běžný rok	24 660	16 700	<b>celkem</b>	<b>123 798</b>
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	11 210	15 000	<i>změna vůči 31.12.2011</i>	16 785
Platby UK v běžném roce	0	16 800		
Platby UK na budoucí rok	0	0		
Platby ILEI a pedagog. komise	0	700		
Kolektivní členství v UEA	924	1 000	Pozn:	
Kolektivní členství v EEU	1 279	1 300	Dar SONS pro kongres LIBE 2011	60 000
Blahopřání, kondolence	1 467	1 000	Dar anonymní člen - děkujeme	20 000
Poplatky bance	237	100	Přísp. AEF konferenci 2012	3 200
Poskytnuté dary	0	8 000	Dot. města Břeclav pro konf. 2012	5 940
Nákup OCR programu	0	7 500		
Záv. k sam. klubům a sekcím	9 714	0		
<b>Výdaje celkem</b>	<b>277 886</b>	<b>305 500</b>	Náklady na Starto 2012 jsou vč. čísla 4/2011 V 2013 přeposíláme dar 8000 Kč od 2 členů ČES na projekt sochy Hlava XXII	

# AGADRAPORTO DE ĈEA

## ekde la kongreso en Šumperk

(daŭrigo de la pasinta numero)

**Starton** daŭre redaktas kvarfoje jare M. Malovec. Disponeblas ĝis 2012 senpage ankaŭ surrete (sur la ĉefpaĝo de [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) klaku al la bildo de Starto). Koncerne enhavon, okazis diskuto pri ev. novaj rubrikoj, kiuj principe eblas, sed estas malsufiĉo da pluaj kontribuantoj – ili estas plu dezirataj! La komitato realigis pluretapan esploron pri intereso pri paperforma aŭ nur elektronikforma Starto (precipe inter dumvivaj membroj). Rezultoj de la enketo aperis en Starto 2012/1 – 60% pretas rezigni pri presita formo de Starto kaj plej multaj el tiuj, kiuj postulas ĝin, pretas ev. krompagi. Pluaj detaloj troviĝas en raporto pri mastrumado kaj propono de nova kotizregularo. Surbaze de la rezultoj nun malaltiĝis nombro de presataj ekzempleroj el 550 al ĉ. 350, kio ŝparis kostojn kaj ebligis nove presi Starton per pli kvalita cifereca (ne ofseta) preso kaj kun almenaŭ kolora koverto.

Dulingvan retejon [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) ekde aprilo 2010 ĉefredaktas P. Dvořáková, kontribuas M. Hruška, rubrikon „Historio“ kaj datumbazon de elstaruloj prizorgas M. Malovec.

Dum la lasta jaro aperis en Aktualajoj entute 100 artikol(et)oj – ĉ. 60% ĉeĥlingve, 40% esperante. Estis aktualigitaj kontaktoj al kluboj, por kompletigado de pluaj rubrikoj dume mankas fortoj, sed eĉ en la nuna stato la retejo supozeble plenumas sian funkcion. Estas planitaj kaj traktataj kelkaj partaj teknikaj plibonigoj (realigeblaj de la administranto A. Tomeček). Pluaj kunlaborantoj estas serĉataj. Laŭ statistiko de Google Ana-

lytics la retejon vizitas ĉiumonate averaĝe 1650 personoj (90% el Ĉeĥio). 58% venas ne laŭ rekte skribita adreso, sed surbaze de serĉado. Aperigo de artikoloj nekocernantaj ekzakte Esperanton (ekz. pri vojaĝrabetoj, komputiloj, lingvoj ĝenerale) laŭ statistiko kontribuas al altigo de nombro de novaj vizitantoj.

[www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz) - la muzean paĝaron redakte transprenis P. Dvořáková. Ĝi estis laŭeble vivigita – aperis pli ol 20 novaj artikoloj (sume ambaŭlingve) kaj 13 novaj fotogalerioj (nove ne nur rilate al aktivecoj de la muzeo, sed ankaŭ ĝeneralaj albumoj – pri E-literaturo ktp.). La problemo estas malalta nombro da vizitoj, manko de kunlaborantoj por kreado de novaj fotoalbumoj. Membroj estas alvokataj por ripetaj vizitoj, informado pri la retejo kaj por kontribuado.

Apartan muzean paĝon ĉe Ipernity <http://www.ipernity.com/doc/181031/> kreis en januaro 2011 kaj redaktas ankaŭ P. Dvořáková. Nuntempe estas en la muzea reto 2048 membroj el pli ol 90 landoj. Dum la lastaj jaroj laŭ statistiko okazis 26 000 virtualaj vizitoj (ekde la estiĝo ĝis septembro 2012 sume ĉ. 46 000, en novembro pli ol 50 000). Ekde oktobro 2011 ĝis septembro 2012 al ĝi estis alŝutitaj 350 novaj dosieroj, el tio i.a. 25 filmetoj kaj 30 sonregistraĵoj. En la retejo Ipernity membras minimume 20 membroj de ĈEA. La retejo havas pozitivan efikon en internacia diskonigo de la muzeo kaj ĝenerala klerigado.



**Retkomunikoj** Koncizajn retaktualaĵojn (inkl. retligilojn al pli detalaj informoj) nove redaktas kaj distribuas M. Hruška. Ekde oktobro 2011 aperis 4 numeroj. Ili estas sendataj retpoŝte al preskaŭ 300 ricevantoj (el tio 53 eksterlandanoj). La listo estas plu kompletigata, dum la jaro ĝi kreskis je minimume 30 novaj ricevantoj el Ĉeĥio. Ekde 2011/4 la Retkomunikoj estas prilaborataj ankaŭ en pli bonaspekta formato PDF kun fotodokumentado. Konsiderinde altiĝis nombro de retligiloj al nove alirebligataj multkomunikaj dokumentoj (parola vorto, muziko, filmoj).

### **Projekto „Esperanto-Muzeo“**

Ekde oktobro 2011 ĈEA havas sian oficialan sidejon en Svitavy ĉe la muzea adreso.

Buntaj aktivecoj okazas dank' al subteno de la urbo kaj dank' al volontuloj precipe el la loka klubo. La muzea grupo gvidata de Libuše Dvořáková estis larĝigita je pluaj kunlaborantoj pri ekspozicioj, pretigon de ekspozicioj garantias P. Dvořáková. Krom akcepto de individuaj kaj grupaj gastoj en la muzeo okazis pluraj Esperanto-aranĝoj (Regiona renkontiĝo kun „malgranda inaŭguro“, junia Muzea nokto kun bunta programo kaj inaŭguro de la ekspozicio „125 jaroj de Esperanto“, Infana tago, Tago de malfermitaj pordoj, Marcipana Kristnasko k.a.). La plej grava estis tutsemajna internacia OSIEK-Konferenco okazinta en julio. Altiĝis ankaŭ kvanto de neesperantaj aranĝoj (ne nur vojaĝprelegoj) okazintaj en la muzea ejo. Danke al M. Čumová estas katalogigitaj jam pli ol 10 000 bibliotekaj unuoj. Muzea komputilo estis kompletigita je novaj multkomunikaj libere elŝuteblaj dosieroj, dum la jaro vigliĝis la muzea retejo, inter-

naciaj kontaktoj kreskas i.a. dank' al la Ipernity-paĝo. Kreskis kaj plivigliĝis ankaŭ grupo de Amikoj de E-Muzeo ĉe Facebook. Pri la muzeaj aktivecoj aperis pluraj informoj en la distrikta gazetarokaj televido. La klubanoj sukcesis de la urbo akiri kaj por uzo pretigi novan deponejon por librostokoj kaj arkivaĵoj.

### **Libroj, gazetarokaj literaturaj aktivecoj**

Libroservo konstatis altigon de enspezo en Břeclav, sed dumjare la aĉetado de libroj pli malpli stagnis. Estis aĉetitaj pluaj novaj titoloj el la eldonejo „Espero“, aĉetebblaj en la E-Muzeo. Okazis transporto de la ĈEA-biblioteko al la nova deponejo en Svitavy. Pro neoptimumaj stokkondiĉoj de Libroservo en Vracov estas planata ankaŭ parta translokigo samloken. Pro neceso de financa stabiligo ĈEA ne riskis eldonon de paperformaj eldonaĵoj kaj koncentriĝis pri disponigo de elektronikaj dosieroj. Plu funkcias abonebleco de eksterlandaj E-gazetoj (prizorgata de P. Polnický), sed ĝi estas malmulte utiligata, kreskas nombro de vizitantoj de rete disponeblaj gazetoj. ĈEA klopodis precizigi kondiĉojn por prunteblo de libroj el la muzea biblioteko kaj aranĝi librojn por eblaj interŝanĝoj.

J. Drahotová kaj J. Pospíšil tradukis al la ĉeĥa lingvo konatan libron de Roman Dobrzynski „Bona espero“ pri bonfara porinfana projekto en Brazilo. La kompleta teksto kun fotodokumentado estas senpage disponebla en

<http://esperanto.wz.cz/drahotova/DobraNadeje.pdf>

Lige kun tio okazis pluraj prelegoj kaj diskutoj ankaŭ por neesperanta publiko.

J. Patera plu eldonis beletrajn tradukojn en Praga bulteno. J. Krolupper esperantigis la poemaron de Z. Bergrová „Mi renkontas vortojn“ (ĉe OFTIS Ústí n.O.) kaj poemkolekton de Č. Vidman „Ludo nomata vivo“, kiun en dulingva formo redaktis kaj helpis eldoni M. Turková.

## **Komputilaj projektoj:**

### **Ciferecigado kaj projekto „Fonoteko“**

La aktivecojn prilaboras precipe duopo M. Malovec kaj V. Türk kaj kelkaj pluaj unuopuloj. Estas ciferecigitaj pli ol 1600 literaturaj tekstoj, kies lingva kontrolo nun okazas. Krome ekzistas plurmil paĝoj da tekstoj kaj leteroj skanitaj kiel bildoj kaj kelkdek ciferecigitaj magneto-fonaj bendoj. Manuskriptoj estas mane retajpataj al komputilo (nove kunlaboras ekz. J. Malá kaj J. Dubinová). Nuntempe okazas klasifikado laŭ taŭgeco por publikigo, dume granda baro estas solvo de juraj kaj financaj problemoj lige kun aŭtoraj rajtoj. Novaĵoj estas kutime alŝutataj al Muzea retejo ĉe Ipernity kaj diskonigataj en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj pere de Retkomunikoj.

Projekto „Karel Čapek“, komencita en 2010, estas parto de la „Fonoteko“. Ĝia ĉefa realiganto estas Vladimír Türk. Dum la lasta jaro aperis 18 novaj registraĵoj precipe (sed ne nur) el „Rakontoj el unua poŝo“. P. Dvořáková sekve redaktis kaj kadre de ĈEA eldonis unu KDon „El verkaro de Karel Čapek“ kaj lumdiskon „Rakontoj el unua poŝo“ (12 horoj da aŭskultado kun legeblaj tekstoj kaj en Esperanto kaj en la ĉeĥa origina-

lo). Ambaŭ estis publike prezentitaj dum OSIEK-Konferenco en Svitavy kaj en Břeclav kaj ili estas aĉeteblaj en Libro-servo. Krom tio estis (precipe kunlabore inter M. Smyčka kaj P. Dvořáková) realigitaj pluaj novaj registraĵoj, aperigitaj precipe en Ipernity (ekz. Lulkanto de Smetana, La Paloma – Mara Kolombo k.a.).

### **Komputila klerigado**

Kompare kun antaŭaj du jaroj okazis ioma malpliigo de aktivecoj. Tamen okazis pluraj seminarioj kaj prelegoj kadre de Vikimanio en Svitavy. V. Türk pretigis du instrukciajn filmetojn pri uzado de la sonprogramo Audacity kaj pri instalado de Skype.

En [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) estis aktualigitaj utilaj rekomendataj retejoj pri la temo.

### **Vikipedio kaj tradukoj de urbaj retpaĝaroj**

Kontribuado de ĈEA-membroj al Esperanta Vikipedio laŭkvante iom malkreskis (malgraŭ instrukciado de novuloj dum Vikimanio), tamen novaj artikoloj aperis. Nuntempe plej aktivis J. Hron. Plu estis prizorgataj artikoloj pri ĉeĥa Esperanto-movado. Kunlaboro de aliaj ĈEA-membroj estas por tio bezonata. Estas preparata aparta esploro pri la temo. En septembro 2012 aperis „Vorto de la urbestro“ sur la ĉefpaĝo de Břeclav [www.breclav.org](http://www.breclav.org) ankaŭ en Esperanto. Tradukoj de paĝaroj pri la monaĥejo Milevsko kaj kastelo Kratochvíle atendas sian aperigon.

*Pavla Dvořáková*





# **Konkretaj instigoj por kunlaboro inter ĈEA, SKEF a AEF**

*konkludoj de la komuna kunsido  
okazinta 29.9.2012  
kadre de la Trilanda Konferenco en  
Břeclav*

## **1. Informado pri la Trilanda Konferenco en gazetaro**

ĈEA – Starto, [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), Ipernity, Břeclavský deník; SKEF – Esperantisto Slovaka, Revuo Esperanto; AEF – Esperanto aktuell

## **2. Reciproka informado kaj aktiva partopreno en aranĝoj**

- SES en Martin 2013, KAEST 2014, EEU-Kongreso en Nitra 2014  
- SKEF-kongreso en Liptovský Mikuláš 2013 - 20-jara datreveno de LEK  
- Esperanto-Muzeo en Svitavy – Muzea nokto (junio 2013), Solenaĵo omaĝe al 5-jariĝo de la muzeo (fino de septembro 2013)  
- ĈEA-kongreso en Prostějov 2014 (?)  
- Zamenhof-Festoj en Vieno (en decembro ĉiujare)

## **3. Ekspoziciaj kaj muzeaj projektoj**

- Disponigo de ekspoziciaj informtekstoj de ĈEA por similaj ekspozicioj en Slovakio  
- Esploro de eblecoj por okazigo de la ekspozicio de Ján Vajs en Svitavy kaj Písek  
- Alvoko al slovakaj kaj aŭstraj esperantistoj kontribui al la nova ekspozicio en E-Muzeo en Svitavy (ĉeftemo: Arta kreemo de esperantistoj)

## **4. Interretaj (komputilaj) projektoj**

- Kunlaboro inter muzeoj en Vieno kaj Svitavy (traktado pri ebla uzo de virtualaj fotoĵoj kaj skanaĵoj k.a.)  
- Komuna kontribuado al Biblioteko de Lernu.net (disponigo de sonregistraĵoj, ciferecigitaj tekstoj, ev. kreado de novaj materialoj)  
- Sonregistrado de beletro (ĉeĥa, slovak, aŭstra)  
- Senpaga uzo de la informa anonco FOIRO de AEF en [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at) ankaŭ por membroj en ĈEA kaj SKEF

## **5. Eldona agado**

- Eldono de esperantaj poŝkalendaretoj  
- Ev. eldono de kodoromo de la kreitaj beletraj sonregistraĵoj

## **6. Financoj**

Esploro de eblecoj pri partopreno en subvenciaj programoj de la Kvaropo de Visegrad

*notis Pavla Dvořáková*

## **STUDENTmuni.cz**

En la februara numero de STUDENTmuni.cz, gazeto eldonata de la Masaryk-universitato en Brno, aperis artikoloj *Má šanci fenomén umělého jazyka?* (Ĉu la fenomeno de artefarita lingvo havas ŝancon?) kaj *Esperanto dělám kvůli komunitě alternativních lidí* (Esperanton mi faras pro komunumo de alternativaj homoj). La redaktorino Jana Šavelková tiamaniere reagis je ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“, kiu estis prezentita en la filozofia fakultato de la universitato.

En la unua artikolo ŝi prezentis la vivon de Zamenhof, koncize parolis pri Volapük, Ido kaj Interlingua kaj montris la gramatikajn finaĵojn de Esperanto, en la dua ŝi intervjuis Marek Blahuš, kiu pasintjare finis siajn studojn en la universitato kaj danke al siaj interretaj lingvaj kursoj trovis okupon en Centro de Lingva Edukado en Brno.

## ĈEA-KONFERENCO OKAZOS 25.-28.10.2013 EN NYMBURK

Estimataj geamikoj,

permesu al ni inviti vin elkore al la Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiu okazos inter la 25-a kaj la 28-a de oktobro 2013 en Nymburk. Ĉar 28.10. estas en Ĉeĥio ŝtata festo, denove ni povos ĝui unu tagon pli ol kutime.



Nia **konferencjo** estos en Faka mezlernejo kaj metilernejo (Střední odborná škola a Střední odborné učiliště) kaj ĝia apuda studenthejmo, en la strato V Kolonii 1804. La konstrua areo situas tuj proksime al la trajna kaj busa stacidomoj. La studenthejmo estas ekipita per lifto kaj disponigas loĝadon en du- kaj tri-litaj ĉambroj kun duŝejo/necesejo komuna ĉiam por 2 ĉambroj. En la domo troviĝos manĝejo kun oferto de plentempa manĝado (ankaŭ por vegetaranoj). Por nia dispono estos granda konferencejo, klubejo por seminarioj kaj vespera babilado kaj parte ankaŭ manĝejo. Kiel kutime, ni klopodos certigi ankaŭ libroservon kaj trinkejon.



Koncerne la **programon**, krom la oficiala labora traktado, kiu okazos sabate antaŭtagmeze, kaj sabata urbotrarigardo, ni pretigas por vi ankaŭ klerigajn kaj diskutajn seminariojn. En la kultura programo ne mankos eta koncerto kun komuna kantado, dancvespero (espereble denove kun tombolo), filmprojekci-ado kaj prezento de Esperanta literaturo. Por dimanĉa ekskursiva posttagmezo vi povos elekti inter du variantoj. La unua grupo povos vojaĝi buse al proksima romantika kastelo Loučeň, verŝajne al multaj ankoraŭ nekonata, ĉar ĝi estis alirebligita nur antaŭ kelkaj jaroj. La kastelo ofertas ne nur trarigardon de belegaj historiaj salonoj, sed ankaŭ promenon tra aŭtune kolorriĉa parko kaj precipe nekutima, kaj en la tuta Eŭropo per sia amplekso vere unika komplekso de 11 diversspecaj labirintoj en la parka areo. Tiuj, kiuj preferos viziti la najbaran banlokon Poděbrady, povos tien veturi per loka trajneto, promeni tra la banloka parko, laŭinterese viziti ekspozicion en la kastelo aŭ la Elbregiona muzeo kaj babili kun geamikoj en la fama kafejo ĉe la ĉefa kolonaro.



*kastelo Loučeň*



*banloka parko en Poděbrady*

Estas ĝojige, ke la urbestro de Nymburk promesis transpreni aŭspicion pri nia aranĝo kaj la urbestro jam aprobis dum sia traktado finanĉan subtenon por parte kovri niajn elspezojn por luado de la konferencujo.

Ni klopodis akiri bonajn financajn kondiĉojn kaj tial la prezo de la restado sendube ne estos pli alta ol estis kutime en la lastaj jaroj.

Estas dezirinde, ke nia konferenco estu laŭeble internacia, por ke estu sencohave praktiki kune la lingvon Esperanto. Jam nun vi povas inviti viajn geamikojn el eksterlando por viziti Ĉeĥion kaj veni al nia konferenco, kaj krom ĝi ankaŭ al Prago aŭ aliaj urboj de nia lando.

En la dua numero de STARTO aperos jam pli precizaj informoj kun aliĝilo kaj prezlisto. Ni esperas, ke jam nun vi notos la daton en viaj kalendaroj.

Ni ĝoje atendas vian intereson kaj vian abundan aliĝon!

Estimplene

ĈEA-estraro

## Cinkova Frazeologie

Josef Cink: **Česko-esperantská frazeologie. Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro.** Editor Jan Werner. MSD Brno 2013, 325 stran, ISBN 978-80-7392-206-1, brožováno, 21x15 cm

Ve slově „frazeologie“ jsou obsažena řecká slova „frázis“ (2. p. „frázeos“ = výraz, vyjádření), a „logoi“ (= slova, přeneseně nauka). Pod tímto pojmem si můžeme představit dvě věci. Nejčastěji je frazeologie chápána jako jazykovědný obor, zabývající se analýzou ustálených slovních spojení, zvaných frazeologismy neboli frazémy. Tato oblast jazykovědy je vynálezem 20. století: za její zakladatele jsou považováni švýcarský lingvista Charles Bally (žák Ferdinanda de Saussura) a americký židovský lingvista Uriel Weinreich, který se zabýval také jazykovým plánováním a interlingvistikou. Zdá se, že jde o disciplínu kvetoucí: bibliografie prací z tohoto oboru (Joachim Lengert, 1999) obsahuje asi 17 500 titulů, které jsou věnovány oblastem frazeologie historické, jednotlivých jazyků (hlavně angličtiny) a frazeologie srovnávací. Obecné teoretické dílo (A. P. Cowie: *Phraseology. Theory, Analysis, and Applications.* Oxford University Press, Oxford 1998) je přístupné i v internetu.

Frazeologii lze také považovat za souhrn (zásobu, inventář, seznam, sbírku ...) jednotlivých frazeologismů jakožto součástí slovní zásoby jazyka. Jako frazeologismus (frazém) je obvykle kvalifikováno víceslovné spojení, ale toto pravidlo se mnohdy dodržuje pouze formálně, např. typický esperantský frazeologis-

mus „krokodili“ je uváděn ve formě „ne krokodilu“. Sbírky frazeologismů (tj. rčení, úsloví, pořekadel apod.) existují už od antických dob, zabývali se jimi např. Aulus Gellius ve 2. stol., Zenobius z Antiochie ve 3. stol., Macrobius Theodosius v 5. stol., Apostolius Byzantius a Polydor Virgilius v 15. stol., a zřejmě nejslavnější sbírkou jsou latinská „Adagia“ Erasma Rotterdamského ze 16. stol. Těto sbírce se dostalo mnoho reedicí i překladů a je vydávána prakticky dodnes. Vyskytují se zde krátké výrazy jako „kolosální“ „labyrint“, „panika“, „chtě-nechtě“ „bílá vrána“, „labutí píseň“, ale i delší sousloví a věty, např. „němý jako ryba“, „slibovat hory doly“, „hrát si hada na prsou“ „jít proti proudu“, „šaty dělají člověka“, „ryba páchne od hlavy“, „drž se, ševče, svého kopyta“, „darovanému koni na zuby nehled“. Zvláštní oblíbenost se těšila adagia vztahující se k antické kultuře, jako „sisyfovská dřina“, „Herkulovy práce“, „červená (Aridanina) nit“ apod. Erasmus nasbíral více než 4500 adagií, která většinou pocházejí z literárních pramenů. To dokazuje, jak velký význam měla tato rčení už v době humanismu: vzdělanci jimi rádi zdobili své projevy, komentovali jimi určité situace, trousili je jako duchaplné zmínky a tím dokazovali svou zběhlost v konverzaci. Není náhodou, že se stejné či podobné frazeologismy vyskytují ve všech evropských jazycích – jsou součástí naší všeobecné kultury, a protože během staletého užívání zlidověly, málokdy si uvědomujeme jejich původ. (Některé mezinárodní frazeologismy ze sbírky Sabiny Fielderové s ilustracemi Pavla Raka vyšly v Praze pod názvem „Ilustrita frazeologio“ v r. 2009.)

Na druhé straně má ovšem každý jednotlivý jazyk své vlastní frazeologismy, specifické pro historické, zeměpisné, kulturní, náboženské a jiné podmínky svých uživatelů. Zatímco u nás lije jako z konve, v Anglii prší kočky a psi, a když to není ono, v Německu to není vaječný žloutek. U nás jezdíme jako blesk, v Itálii jako Nuvolari, my nosíme dříví do lesa a Řekové sovy do Athén. A teď *babo rad'*, jaké frazeologismy máme užívat v esperantu, které je jazykem mezinárodním. Na jedné straně má už vlastní kulturu a *tím pádem* i vlastní frazeologismy, které jsou pro nezasvěceného posluchače *španělská vesnice*, protože se vztahují k historii (např. „kabei“, „jam temp' está“), k literatuře („kredu min, sinjorino“, „obstino, espero kaj pacienco“), k praxi („eterna komentanto“) atd.. Esperanto má i rodilé mluvčí, ale ti jsou ovlivněni také kulturou země, ve které trvale žijí. Esperantské jazykové zázemí má ovšem vzácné specifikum: každý může *přispět svou troškou do mlýna*. Učíme-li se anglicky, samozřejmě umíme zpívat „Happy Birthday“, víme kdo byl Abraham Lincoln nebo Mark Twain, kde leží Tower, co je Big Ben a kolik států je v USA. S etnickým jazykem absorbujeme také kulturu jeho rodilých mluvčích, ale sami k ní nijak nepřispíváme. S esperantem dostáváme jedinečnou možnost podílet se na obohacování jazyka i jeho zázemí, spoluvytvářet jeho kulturu tím, že do ní vnášíme své vlastní poznatky, vlastní etnické rysy – a vlastní frazeologismy. Jediné, co k tomu potřebujeme, je adekvátní vyjádření nebo překlad frazeologismů naší mateřštiny.

To si jistě uvědomil i Josef Cink, vynikající esperantista a pedagog, autor oblíbených učebnic esperanta, citlivý překladatel písňových textů. Jeho sbírka českých frazeologismů s esperantskými ekvivalenty má přes 300 stran. Shromáždění esperantských frazeologismů a hledání jejich českých podob bylo zcela určitě prací náročnou (přesvědčíme se o tom např. u hesla „prášil“, kde jsou registrovány literární překlady od r. 1924 do r. 1991). Na druhé straně sbíral Cink také frazeologismy typicky české, včetně hovorových výrazů, kterým přiřazoval adekvátní výrazy esperantské, nebo je sám překládal – podle potřeby někdy doslova, jindy podle smyslu. Na podrobnosti se už bohužel autora nemůžeme zeptat, zemřel v roce 2011. Cinkovo dílo se nám přece jen dostává do rukou díky obětavé práci vydavatele Jana Wenera. Ten nás v úvodních poznámkách seznamuje s charakterem frazeologismů obecně a postihuje detaily kvazisynonym „rčení“, „pořekadlo“ a „úsluví“, což v esperantu není lehké. Přínosné pro esperantskou terminologii je Wernerovo jednoznačné vymezení frazeologie jako vědního oboru, zatímco souhrn frazeologismů (tedy frazeologie ve svém druhém významu) je přesněji označen jako frazeologický slovník (frazeologia vortaro), jímž Cinkova kniha vpodstatě je.

Za úvodními poznámkami následují instrukce k užití slovníku a esperantský seznam hesel, který umožňuje nečeskému uživateli najít příslušný český ekvivalent ve slovníku samotném. Ve vydavatelově předmluvě se dozvídáme o jedinečnosti Cinkovy práce – většinu uvedených výrazů doposud v žádném překladovém slovníku nenajdeme.

Frazeologismy jsou abecedně řazeny pod jednotlivými hlavními hesly, některé ojediněle sestávají pouze z tohoto hesla a jeho esperantského překladu nebo synonymních překladů, např. „šosák“ = snobo, filistro, etburĝo; pro „blátošlap“ se nám nabízejí výrazy piediranto, koto-tretulo, kotoplantulo, polvotretanto – první stylisticky téměř neutrální, další citově zabarvené, snad neobvyklé, ale regulérně gramaticky vytvořené a naprosto srozumitelné. Stejně srozumitelné jsou např. výrazy „entrudemulo“ (dotěra), „koltranĉulo“ (hrdlořez), „karto-manio“ (karban), „flavbekulo“ (nováček), třebaže nepatří do zcela běžné esperantské slovní zásoby, narozdíl od např. „kofrego“ (loďák), „reciproka servo“ (protislužba), „neatendite, subite“ (zničehonic) ap.

Cink převádí do esperanta i výrazy stylisticky zabarvené a hovorové, jejichž výstižný překlad je opravdu obtížný, jako biflovat, babrat, dožrat se, extrabuŝti, fajrunt, fracek, frmol, flink, nalejvárna, rachota, rejžovat apod., přičemž většinou uvádí několik esperantských synonym, nezdá se stylisticky odstupňovaných. Na druhé straně nacházíme zcela střízlivý a přesný překlad frazeologismů jako např. „tio ne estas trinkebla“ (to se nedá pít), „okazo kreas ŝteliston“ (příležitost dělá zloděje), „senfenda logiko/nuda logiko“ (železná logika).

Nejzajímavější jsou Cinkovy překlady rýmované, na které ostatně jeho vydavatel upozorňuje a vysvětluje je jednak tím, že Cink rád překládá písňe, a také tím, že se hlavně lidové pranostiky a přísloví hojně vyskytují ve veršované podobě, a jsou proto lépe zapamatovatel-

né. Příklady: Kia la homo, tia la nomo (nomen-omen). Drinki ĝis la falo laŭ horizontalo (zpít se do němoty). Vi ne havas kialon plendi pri la fatalo (nemáš si proč naříkat). La rajta tendenco pli rajtas ol potenco (právo je silnější než moc). Unu mano karesas kaj la dua agresas (jednou rukou hladí, druhou škrábe). De zorgoj, ne de jaroj, griziĝas la haroj (vlasý šedivějí ne lety, ale starostmi). U „práce kvapná málo platná“ najdeme dokonce osm různých převodů, převážně rýmovaných.

V některých případech se rýmovaná podoba už déle vyskytuje u běžně užívaného esperantského ekvivalentu, jako „kie estas volo, tie estas vojo“ (když se chce, tak to jde, u Cinka: kdo chce, ten může), „komenco bona – laboro duona“ (s chutí do toho a půl je hotovo), „neniu estas profeto en sia urbeto“ (nikdo nebývá doma prorokem), „ne ŝovu la nazon en fremdan vazon“ (nestrkej nos do cizích věcí), „mankas klapo en ies kapo“ (mít v hlavě o kolečko míň).

Někde opatřil autor překlad i krátkou vysvětlivkou, např. u variant hesla „blá-zinec“ jsou vysvětlivky u „brua ĝangalo, foiro“ (hluk a zmatek) a „tumulto“ (shon). Podobně např. „Longaj haroj – en pensoj baroj. Virino.“ (Dlouhé vlasý, krátký rozum). „Li estas obstinulo (durkapulo)“ (Je jako beran [tvrdohlavý]).

Celkově vzato projevil Cink při hledání a tvoření vhodných esperantských ekvivalentů velkou vynalézavost a různorodost, které nesporně přispějí k praktickému využití jeho knihy. Jak poznamenává Vlastimil Kočvara ve svém komentáři na zadní straně obálky, potřebuje takovouto

pomůcku při své práci každý překladatel do esperanta. Ne každý totiž vlastní takový talent jako třeba nedostižný překladatel Karla Čapka Josef Vondroušek. Při překladu z etnického do mezinárodního jazyka nejde jen o jednotlivá slova a jejich význam, ale i o zachování stylu, přenesení nálady a celkového dojmu originálu za využití všech slovotvorných a stylistických prostředků. Už při zběžném listování Cinkovou příručkou si s údivem uvědomujeme, kolik takových možností nám nabízí náš rodný jazyk. Ty teď můžeme nabídnout i esperantskému světu, pochlubit se bohatstvím češtiny a zároveň obohatit slovní zásobu esperanta.

Tato kniha je navíc i přínosem k srovnávací frazeologii. Zběhlý esperantista zde nejen najde české ekvivalenty známých esperantských frazeologismů, ale pokud ovládá i jiné jazyky nebo pochází z jiného jazykového prostředí, má možnost porovnat výrazy české a cizojazyčné, hledat jejich paralely, rozdíly a vzájemné vlivy, a to nejen k vlastnímu poučení – takové srovnání si dokážu představit i jako téma vědecké práce.

Formální stránka knihy (úprava a uspořádání stran, informace a poznámky, obálka, tisk) je decentní a profesionální, nepodařilo se mi najít ani překlepy, ani chyby v sazbě. Českým i zahraničním esperantským uživatelům ji mohu doporučit po všech stránkách.

*Paderborn 17.2.2013  
Věra Barandovská-Frank*

## Frazeologio de Josef Cink

La 325-paĝa Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro de Josef Cink (1933-2011) kun 12 000 frazeologiaj esprimoj estis eldonita de Societo por Internacia Lingvo Esperanto en Brno. Mendojn akceptas



Bohumila Trzosová, Koblížná 13, 602 00 Brno  
[bohula@centrum.cz](mailto:bohula@centrum.cz)

La libron preparis por eldono Jan Werner kun pluraj kunlaborantoj. La eldonon ebligis pli ol ducent antaŭmendoj.

Prezo 160,- Kč.

## Peter Baláž

### Esperantisto de la Jaro

33-jara slovaka esperantisto, kunordiganto de la asocio Edukado@Interreto (E@I) estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2012 pro starigo, evoluigo kaj prizorgo de gravaj retaj projektoj; modela kunlaboro kun landaj kaj Eŭropaj instancoj; okazigo de la Somera Esperanto-Lernejo kaj de la scienca konferenco KAEST; eldono de gravaj diskaj, libroj, broŝuroj kaj filmoj en/pri Esperanto; kaj pro tio, ke li sukcesas stimuli kaj (re)aktivigi multajn talentajn gejunulojn, kiuj sen tio eble perdus intereson pri Esperanto.



La projekton proklami ĉiujare Esperantiston de la Jaro iniciatis en 1988 la internacia sendependa gazeto „La Ondo de Esperanto“.

## El Esperantujo

■ La 3-an Internacian Festivalon de E-kanto, recitado, oratora konkurso aranĝas en la bulgara Karlovo-Sopot (5.-7.4.2014) BEA kun loka universitato. Estas kvin aĝo-grupoj (ĝis 12, 13-18, 19-35, 36-50, super 50). Aliĝoj: Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM, [leonov@rozabg.com](mailto:leonov@rozabg.com).

■ La 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) okazos inter la 6-a kaj 14-a de julio 2013 en la litova urbo Utena. Aliĝilojn petu ĉe Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt).

■ Konkursado de Samideano estas literatura kaj fotografa konkurso de italaj esperantistoj. Detalojn oni povas trovi ĉe <http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KONKURSO.html>. La limdato por konkursaĵoj estas la 22-a de oktobro 2013.

■ Verda Stacio en la reto ĉiutage proponas novaĵojn en Esperanto, diversajn kulturajn programojn, ekz. Najadon de Antonín Dvořák, rigardu la retejon [www.verdastacio.net](http://www.verdastacio.net).

■ Poetino Věra Ludíková, amikino de Esperanto, parolis la 17-an de novembro 2012 en Ĉeĥa Konferenco pri Komenio, ŝian paroladon oni povas aŭdi ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=J7TpOzzG4SU>.

■ Setkání se slovy Zdenky Bergrové (Renkonto kun la vortoj de Zdenka Bergrová) estas titolo de artikolo en la gazeto *Slovanská vzájemnost* (Slava interamikeco) elŝutebla ĉe la adreso: <http://www.slovanskyvyborcr.cz/SloVza/SloVza161.pdf>. La artikolo alportas foton de la poetino kun la edzo, kiam ili estis mezaĝaj.

■ Skulptisto Zdeněk Myslivec verkis por la januara numero de la gazeto Včelařství (Abelbredado) artikolon pri sia vizito de abelbredisto-esperantisto en Normandio Jean Pierre Sauvage, kun kiu li komunikis per la internacia lingvo. La artikolo estas trovebla ĉe la retejo:

[http://evinatelier.cz/?page\\_id=963](http://evinatelier.cz/?page_id=963).

■ Jam de 15 jaroj fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉitaj al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de Esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la studoj okazas instruista specialiĝo. Kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net tio kiel instruista trejnado estas ofertata ankaŭ al pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro.

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>.

■ Dum la pasintaj dek jaroj, **lernu.net** provizis senpagajn kursojn de Esperanto al kreskanta uzantaro de pli ol 130 000 uzantoj. La teamo de *lernu!* nun laboras je kompleta refaro de la paĝaro, por lanĉiĝi en frua 2013. La nova *lernu!* inkluzivos novajn kursojn kaj lernomaterialojn. La laboroj tamen kostas multe. Via donaco estos investo en la estonto de Esperanto – eduki la venontan generacion de esperantistoj kaj disvolvi la teknologiojn kiuj helpas nunajn kaj estontajn esperantistojn dum ili lernas, uzas, pristudas, kaj disvastigas la lingvon.

[http://cs.lernu.net/pri\\_lernu/subteno/fina\\_nce.php](http://cs.lernu.net/pri_lernu/subteno/fina_nce.php).



## RUSISTOJ – RUSOJ – kaj ESPERANTISTOJ

proksime en tiu sekvo mi parolis antaŭ publiko la 5-an de januaro en Brno...

La publiko konsistis el partoprenantoj de la 3-a internacia rusa konferenco de la Sudmoravia regiono.

Ĝi okazis sub aŭspicio de ŝtataj rusaj reprezentantoj en Ĉeĥa respubliko (Praha, Brno) kaj hetmano de la menciita regiono. Ĝi estis lokita en aŭlo de la Pedagogia fakultato de Masaryk-universitato, de ties fako por rusa lingvo. Ĉiuj delegitoj de supre menciitaj oficoj bonvenigis la konferencon kaj salutis la partoprenantojn. Ni – esperantistoj, estis tien invitataj baze de jam kelkjara kunlaboro, sur kampo de tradukado. Pri kio temis, montras jena parolo.

... „Vicigo de titoloj havas sian sencon. Ĝuste tiel iris nia agado. Nature, ke mi devas komenci de la komenco – do mi devas sur tiu ĉi loko prononci la nomon Zdenka Bergrová. Vi ĉiuj certe „jam estas hejme“, sed ni, kiam ni komencis tradukadi ŝiajn poemojn, havis eĉ ne etan scion, ke ŝi estas fama rusisto. Ni povus nun honti, sed tio nin apenaŭ senkulpigus. Male – kiam nin sinjorino Bergrová invitis por omaĝi ŝian 85-an vivjubileon (kiun organizis la rusa komunumo en Prago), ni jam povis fieri pri la 2-a volumeto de ŝiaj poemoj tradukitaj en Esperanto. Mi diris antaŭ la multnombra partoprenantaro, ke estas preskaŭ ĉiuj ŝiaj poem-volumoj tradukitaj en tiun ĉi „lingvon tiel taŭgan por la poezio“, kiel esprimiĝis alia ĉeestanta poetino – Věra Ludíková; kaj ke ili ambaŭ deziras esti tradukataj ankaŭ pro tio, ke tiel povas esti iliaj verkoj – la spirito de la ĉeĥa lingvo-kulturo – disvastigataj

en la mondon. Kion mi ankaŭ dokumentis: tiujare mi prezentis la verkon „Kosmo sonoras per steloj“ en UK-Jokohamo (2007).

Ĉe supre menciita jubil-omaĝo deklamis per sia agrabla voĉo Alfred Strejček verkojn de Puŝkin, Lermontov, Njekrasov, kaj certe de aliaj rusaj aŭtoroj, en traduko de Zdenka Bergrová. Poste elstaris unu bela, impetiga virino, kiu nin ravis. Kaj tiu ĉi estis – jen antaŭ ni sidanta organizantino de ĉiu rusa agado, inkluzive la konferencojn – Ljubov Vondroušková. Atendis min pli granda surprizo, kiam la kolego Jaroslav Krolupper diris: „Demandu de sinjorino Vondroušková, ĉu mi rajtus traduki ŝian poezion en Esperanton.“ Mi ne eĉ supozetis, ke li regas la rusan lingvon tiel bone, ke li kuraĝas traduki ĝin rekten en Esperanton. Sed tiel estis, kaj estas. Jen mi montras al vi 3 maldikajn volumetojn de lirikaĵoj (L.V. eble aliajn ne kreas)...

Traduki estas unu afero – kaj publikigi, ekspedi tion inter la publikon – estas la 2-a etapo de la laboro. Kaj ĝuste pri tio temas, pri tio ni zorgas, ke la beleco, ĉarmo de la nacia lingvo estu perita al la mondo – nu jen, fare de la nia internacia lingvo. Same, kiel ni la poezion de Z. Bergrová montris en UK-Jokohamo, kaj poste en Bjalistoko, kunprenis la poezion de L. Vondroušková niaj partoprenantoj al la Rusa Federacia Esperanto-kongreso en Petrogrado; ili ne alvenis sen donacetoj...

Jaroslav Krolupper, kiel la aŭtoro de tradukaĵoj, mem zorgas pri la publikado de siaj verkoj. Tial li ilin forsendadas al Esperantomuzeo en Vieno, al literaturaj gazetoj en Bulgario, Svedio k.s. Jen, en mia mano estas 3 recenzoj (ilin mi ne legis – M.T.), kiuj estas pruvoj, ke ni ne

lasas nur hejme, kion ni „bakis“... Ĉu tiu ĉi vort-nutraĵo estos digestebla por ambaŭ flankoj, ni provis jam 3-foje. Kaj tion ĝuste inter ĉeestantoj, kiuj similas al la hodiaŭaj: via organizantino, L. Vondroušková, nin invitis al literatura seanco – 2-foje tio estis en Brno (la Mahenbiblioteko), kaj 1-foje en Mokrá (kie ŝi loĝas), en la domo de kulturo.

Por ke sinjorino Vondroušková ne ruĝigu tro pro mia ofta mencio de ŝia nomo, mi revenu ankoraŭ al la nomoj Bergrová – Bergr. Ne nur ke tio estis – kaj ĉiam estas – la „duopo“, ĉar s-ro Bergr senĉese zorgas pri literatura heredaĵo de sia edzino Zdenka kaj instigas eldonadon de ŝia poezio kaj prozo. Kaj tion ankaŭ en Esperanto. Ŝia rememorverko „Infanoj de la respubliko“ eldoniĝas en la praga „Bulteno“ (en traduko de J. Patera), J. Krolupper tradukis ŝian poem-verkon „Reeĥoj de Li Po“ sub la titolo „Aŭtuna Luno“, kaj ĉi-jare la antologion (laŭ elekto de V. Bergr) – „Mi renkontas vortojn“.

Kiel oni kutimas diri – ni esperas, ke nia kunlaboro daŭros. Kvankam ni ne estas rusoj, nek rusistoj, ni ŝatas la rusan lingvon – tion mi diras pri mi mem, kaj pri mia kolego Jaroslav Krolupper.“

Poste mi deklamis esperantan version de la poemo, per kiu L.V. inaŭguris sian elstaron komence de la konferenco:

#### MORAVIO

Sunlumo sur vinberojn falas,  
Ĝi Moravion ekeskalas.  
Al ĝia grundo mi min ligas,  
Min kiel foston enterigas.  
Tamen nenion mi forgesas,  
Nek Volgon, nek Petro-remparon.  
Tie printempe vent' karesas  
La vastan de tulipoj skvaron.

En Ĉeĥio fekundaj hortoj,  
Tiuj verdaj kaj sanktaj fortoj.  
La kor-ampolon superfluas  
Ruĝa vino – kaj mi ĝin ĝuas.  
Mi pie kaj humile pentas...  
Min feliĉigas la magio  
De Moravio, de Rusio –  
Duopa forto eminentas.  
Multiĝas de la fort' provizo  
En moravia paradizo.  
Mi ligas min al grundo ĝia –  
Vere la tutan mion mian!

*Margit Turková*

## REMEMORO AL HAŠEK

Naŭdek jarojn, kiuj pasis post la morto de la mondfama verkisto Jaroslav Hašek, rememoris sabate, ĉe lia tombo en Lipnice nad Sázavou membroj de la „Internacia asocio J. Hašek (Hašek)“, liaj admirantoj kaj anoj de la vasta familio kun lia nepo Richard Hašek kaploke...

„La ĉefa entrepreno omaĝe al la personeco de J.H. estos la internacia konferenco, kiu okazos fine de aprilo, ĉar li naskiĝis la 30-an de aprilo, antaŭ 130 jaroj. Pri lia verko, tradukita al 58 lingvoj, alveturos por diskuti fakuloj en dudek lingvoj,“ informis Richard H.

Parto de la omaĝ-evento, la 27-an de aprilo, estos ankaŭ senvualigo de la skulptaĵo, kies aŭtoro estas Radek Dvořák. Sian verkon li nomis per fama titolo: „Kapo XXII“. Ĝi estas dispartigita busto de Jaroslav Hašek, kun citaĵoj el lia verko en 10 lingvoj. La citaĵoj rememorigas inspiradon, kiun ricevis la verkisto de la „Kapo XXII“ Joseph Heller ĝuste el la fama verko de Hašek – do el „Švejk“.

*(fino sur p. 24)*

## Renkontiĝo en Šumperk

Kiel kutime la duan ĵaŭdon en monato, unufoje ĉi-jare, okazis kunveno de malgranda grupo de esperantistoj en Šumperk, nome en la fama restoracio meksika *Red Rat* (Ruĝa Rato). Ni ne havas propran kunvenejon, sed en la restoracio estas agrabla saloneto ĉiam rezervata por ni kun trinkaĵoj kaj bon-gustaj meksikaj manĝoj.



Ne venis ĉiuj pro privataj okupiĝoj. La ĉeestantoj diskutis pri jarfina amuza renkontiĝo en Česká Třebová (el nia klubo partoprenis Kvido Janík kaj Franta Plašek) kaj pri programo por nia maja renkontiĝo en Šumperk.

Ankoraŭ unu foto de nia kunveno, oni povas en la restoracio preni fotojn kun meksikaj ĉapeloj, kiuj estas surloke kelkaj prunteblaj, ankaŭ estas du kanonetoj, pafiloj ktp. Sur la foto estas nia nova anino Blanka Nohelová, kiu jam post duono de jaro bone uzas Esperanton kaj aranĝis ankaŭ ekskurson en ŝia laborejo.



*Karel Vala*

## E-klubo Benešov jubileas

La unua esperantista klubo en nia urbo estis fondita en 1922, unu jaron post UK en Praha. Tamen nia nuntempa klubo estiĝis nur en marto 1983 ĉe la Urba Kulturcentro Benešov, do nun ni festas 30-jariĝon.

Dank' al nia klubanino antaŭ nelonge forpasinta, s-ino Alena Temelová, ni akiris multajn informojn pri la malnova klubo en la Distrikta Arkivo, kie postlasis siajn rememorojn iama kluba komitatano Josef Hřebíček.

La klubo ekzistis inter 1922-1933, en 1939 ĝi estis nuligita oficiale. Fondis ĝin gimnazianoj de la dua klaso, kiuj lernis laŭ la kurso sur dorsa paĝo de la gazeto *Malý čtenář* (Eta leganto), verkita de Julie Šupichová. Ili estis Václav Čedík, posta kuracisto kaj konata kontraŭ-faŝisma rezistanto, Ladislav Hruška, Josef Hřebíček. En sekvaj jaroj aperas nomoj Oldřich Straka, skolto kaj dokumenta fotisto, Karel Šturm, oficisto de landa politika administrejo, Kozák, Bartoň, Marie kaj Karla Holoubková (nevinoj de pentristo František Holoubek), Josef Schwartz, Věra kaj Marie Hovorková, Otokar Fišer, František Tábor, K. Velehradský, Jar. Zeman, J. Dušák, J. Černý, Krátký. Grava estis posedanto de firma Sugosa, Josef Dolanský, kiu transloĝiĝis al Benešov, sed lian vivon finis aŭto-akcidento. Interesajn informojn liveris s-ro Danihelovský, s-inoj Albína Scharfová kaj Anděla Mikolajková.

Ankaŭ nian nunan klubon fondis en 1983 gimnazianoj, sed post 1989 aperis aliaj prioritatoj. La nuntempa junularo preferas interretajn aktivadojn antaŭ la kluba vivo.

*Václav Stibůrek*

# NI INVITAS VIN AL MUZEA NOKTO EN SVITAVY

## sabate la 8-an de junio 2013

Denove ni pretigas por vi inaŭguron de nova ekspozicio kun riĉa akompana kultura programo! La ĉi-jara temo „**ESPERANTO KAJ MUZOJ**“ pritraktos vaste la temon de artaj (ne nur figurartaj) verkoj en Esperanto, artaĵoj rilataj al Esperanto kaj diversspecaj artverkoj kreitaj de esperantistoj. La akompana programo inkluzivos kompreneble ankaŭ muzikon, literaturon kaj filmon. Ni akceptas proponojn de taŭgaj ekspoziciaĵoj aŭ programeroj taŭgaj por la Muzea nokto ĉe la adreso [muzeagrupo@esperanto.cz](mailto:muzeagrupo@esperanto.cz).

### **SKIZA PROGRAMO:**

ĉirkaŭ 12:00 alveno de trajnoj el diversaj direktoj  
ekde 12:30 por interesitoj komuna tagmanĝo kaj babilado  
en la restoracio Astra  
13:30-14:00 malfermo de la Esperanto-muzeo  
14:00-15:45 kultura kaj kleriga programo por esperantistoj  
16:00-17:30 solena inaŭguro de la nova ekspozicio  
„ESPERANTO KAJ MUZOJ“ kun akompana  
programo (ankaŭ por publiko, okazos dulingve)  
ekde 18:00 partopreno en programoj de la Muzea nokto en Urba Muzeo  
ĝisnokte kaj Galerio kaj en salonego de la Domo de Ottendorfer;  
babilado kun geamikoj en vinoteko aŭ teejo  
projekciado, laŭinterese antaŭdorma Esperanto-kantado kun gitaro



Dimanĉe antaŭtagmeze proponatas duontaga **ekskurso** al la renesanca kastelo Moravská Třebová (vojaĝo 16 km per normala buslinio, prezo de enirbiletoj por 2 linioj – klasika arthistoria kaj alkemia laboratorio – estas 110,-CZK, por pensiuloj kaj studentoj 70,-CZK).

Ebleco de **tranokto** en studenthejmo en 2- kaj 3-litaj ĉambroj (kun necesejo/duŝejo komuna por 2 ĉambroj), proksime al la muzeo. Necesas DEVONTIGA mendo plej malfrue **ĝis la 15-a de majo!** Prezo – 200,-CZK/nokto/persono. Ebleco mem pretigi matenmanĝon en la kuirejeto. Ebleco de tranokto por 1 aŭ 2 noktoj (jam ekde vendredo). Kondiĉo por akcepto de nia mendo estas almenaŭ 20 interesitoj, tial bv. ne prokrasti la aliĝon!

Tranokton kaj ekskurson (necesas antaŭmendi grupan trarigardon) bv. ĝustatempe mendi ĉe [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz) aŭ al Český esperantský svaz, nám. Míru 1, 568 02 Svitavy, aŭ telefone kontakti Libuše Dvořáková ĉe la numero 604 377 616. Partopreno en la programo kaj refreŝiĝo kadre de la ekspozicia inaŭguro estas komplete SENPAGAJ.

NI ESPERAS PRI VIA ABUNDA ALVENO KAJ ANTAŬĜOJAS!

## AKTUALAĴOJ EL PÍSEK

AnkRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo) okazis sabate la 8-an de decembro 2012 kaj krom sudbohemianoj vizitis ĝin ankaŭ gastoj el kluboj el Prago, Benešov kaj Pilseno. Tradicia posttagmeza programo, komponita el kristnaskaj kaj popolaj kristnaskaj tradicioj (alportado de Lumo, komuna legado el la Evangelio, kristnaska medito, kantado, disdonado de donacetoj, tranĉado kaj komuna manĝado de la pomo, poeziaj mesaĝoj), okazis ĉi-foje unufoje en salono de t.n. ĉevalejo de la urba paroĥejo, denove en solena kaj amikeca etoso. Aparte menciindas, ke jam la 4-an fojon antaŭtagmeze okazis **ADVENTA MATINEO**, organizata kunlabore kun Urba Biblioteko en ĝia klubejo. Tiu ĉi aranĝo estas ĉeĥlingva kaj destinata do ne nur por partoprenantoj de AnkRo, sed ankaŭ por vasta publiko. La programon gvidis Pavla Dvořáková, kun aktiva partopreno de Miroslav Smyčka, Margit Turková, Zdenka Folková kaj Leona Holubová. En esea-medita formo estis prezentitaj kelkaj inspiraj ideoj „KIEL EN LA NUNA TEMPO PASIGI SENCOHAVE ADVENTON“ (malrapidiĝi kaj silentiĝi, trovi tempon por korsatiga legado, anstataŭ SMSoj skribi pli da sincere kaj ne al ĉiu samvorte skribitaj bondezirkartoj, pere de fabeloj ekvidi kaj ekestimi animon en ĉiu viva/eĉ neviva estaĵo kaj percepti la mondon kiel grandan miraklon kaj misteron, ne nur konsumi belaĵojn, sed ankaŭ mem kontribui al ilia kreado ktp). En tio Esperanto rolis kiel lingvo de kelkaj teme taŭgaj kulturaj programeroj (literaturaj kaj muzikaj): eksonis ekz. belega „*Kristnaska Kanto*“ (Cantique de Noël) de Adoplhe Adam, „*Alve-*

*nu fidelaj*“ (Adeste fideles) kaj „*Lulkanto*“ el la opero „*La Kiso*“ de Smetana, kaj dulingve ĉarma poemo de Fráňa Šrámek „*Decembro*“ (ambaŭ eblas aŭskulti en la retejo Ipernity). Plue estis prezentita nova spegula dulingva poezia libro de Čestmír Vidman „*Ludo nomata vivo*“ kun ambaŭlingva deklamado de kelkaj novjaraj bondezirpoemoj kaj ankaŭ lia kvazaŭfabelo „*Kiel kristnaska arbeto vagadis*“. Estis prezentita aŭtobiografia libro de en Písek tre populara pastro Josef Kobza, kiu mallonge rakontis, kiel Esperanto riĉigis lian vivon. Oni ankaŭ aŭdis salutpoemon de doktoro Max Kašparů, kiu dum la antaŭaj du jaroj estis la ĉefa gasto de la matineo kaj ĉi-foje pro malsano ne povis alveni. Fine de la programo la partoprenantoj povis kune kanti kristnaskan kanton „*Stála Panenka Maria*“ (aŭ „*Marie a anděl*“) en paralela ĉeĥa kaj esperanta (ĵus estigita) traduko. Tiel ankaŭ la ĉeestintaj neesperantistoj krom la proponitaj kristnaskaj kuketoj povis mem gustumi ankaŭ Esperanton en sia buŝo ...

Krome antaŭ kaj post la aranĝo la partoprenantoj povis rigardi malgrandan ekspozicion pri diversĝenraj Esperantaj libroj. Aldonendas, ke la tutan programon ĉi-foje tuttempe partoprenis la direktoro de la biblioteko kun tuta sia familio kaj li kaj lia edzino esprimiĝis pri la matineo tre favore. La direktoro s-ro Roman Dub favoras la ideon de Esperanto. Jam en marto 2010 en la biblioteko okazis premiero de la migra ekspozicio „*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*“ kaj ekde novembro 2011 la biblioteko, kiel la unua en Ĉeĥio, havas sur sia retpaĝaro ankaŭ informojn pri si krom en la angla kaj la germana ankaŭ en Esperanto.

La 10-an de februaro 2013 pluraj membroj de EK „La Ponto“ partoprenis kulturen posttagmezon dediĉitan al 90-jara datreveno de la forpaso de la ĉeĥa poeto Adolf Heyduk, kiu havas en Písek belan apartan memordon. La interesan programon gvidis direktoro de la Muzeo de la Regiono Prácheň doktoro Jiří Prášek, i.a. ankaŭ favoranto de Esperanto. Tial fine de la programo la publiko povis aŭskulti porinterese ankaŭ unu poemon de Heyduk – „*Sonorilo*“ – paralele en la ĉeĥa kaj en traduko al Esperanto. Tiel neokulfrape kaj pogute homoj povas ekkonscii pri ekzisto de la lingvo, pri ĝia belsoneco kaj ĝia kultura valoro ... Pri prezento de Esperanto dum tiu ĉi aranĝo sekve raportis la distrikta semajnjurnalo „Písecké postřehy“ kaj „sablanoj“ mem nun verkas propran artikolon por la gazetaro. Kaj kial ni skribas pri tio? Ĉar verŝajne ia tia eta aktivaĵo ja povas esti realigebla ankaŭ en via urbo! Provu mem esplori! Kluba jarkunveno kaj sekva kultura programo okazos en Písek la 7-an de aprilo. Gastoj estas bonvenaj.

–*padv*–

## Artikoloj pri Esperanto

■ La 8-an de januaro la distrikta ĵurnalo „Jiskra Benešov“ aperigis artikolon de Václav Stibůrek „L. L. Zamenhof, 125 let esperanta a Benešov“ (rete legebla en <http://www.jiskrabenesov.cz/clanek/1661>), kiun nun sekvas seria lingvokurso. Pri Esperanto prelegis / diskutis V. Stibůrek en la Urba Biblioteko Benešov la 26-an de februaro 2013. Samloke okazos en majo kaj junio migra ekspozicio „Ĉu estas Esperanto morta lingvo?“

■ Ĉeĥlingva artikolo de M. Turková pri tradukoj de Hašek al Esperanto aperis en la prestiĝa gazeto TOP (presorgano de Unio de interpretistoj kaj tradukistoj), artikolon de M. Malovec pri tradukoj al la ĉina lingvo pere de Esperanto aperigis la gazeto Fénix (presorgano de la Ĉeĥa-ĉina societo).

## Subvencio por la muzeo

Biblioteko de Esperanto-Muzeo sukcesis en subvencia konkurso de la fonduso „Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen“ kaj povis kompletigi sian kolekton per novaj altvaloraj publikaĵoj en suma prezo 155 eŭroj.

## SET Lančov

Tute nova retejo <http://set-lancov.cz> invitas al tri etapoj (30.6.-13.7. – 14.7.-27.7. – 28.7.-9.8.2013) por lerni Esperanton (3750 Kč, ekde 16-jaroj 3950 Kč) aŭ la anglan, germanan, eventuale rusan kaj hispanan (4050 Kč, ekde 16 jaroj 4250 Kč). Esperanto PO BOX, 674 01 Třebíč, [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz).

## SES Martin



Somera Esperanto-Studado okazos ĉi-jare en la slovaka urbo Martin (12.-20.7.2013), <http://ses.ikso.net/>.

## 90-a Germana Esperanto-Kongreso




Nürnberg 17.-20.05.2013

Informoj kaj reta aliĝilo:

<http://www.esperanto.de/gek>

# INVITO AL AMIKA RENKONTIĜO

en Ĉeĥan paradizon, en la familian pensionon ESPERO, en vilaĝeto SKOKOVY – 75 km nordoriente de Prago. En la kolorriĉa aŭtuna naturo ĝi okazos de la **15-a aprilo ĝis la 21-a aprilo 2013**,



Venu inter homojn sanajn,

handikapitajn, junajn kaj maljunajn, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui familian etoson, naturon, aŭ kiuj nur deziras scii ion pri la lingvo, aŭ volas nur promeni kaj ĝui la naturon.

Oni povas ekzerci la korpon kaj spiriton, krei permane memoraĵojn kaj babili en amika atmosfero.

Senbariera medio, 2- ĝis 5-litaj ĉambroj, prezo 420 Kč/tago (1 Eŭro = 25 Kč). Lavujo en ĉiu ĉambro, duŝejoj kaj necesejoj en koridoro.

Alveno trajne sur linio Praha – Turnov en la stacion Loukov u Mnichova Hradiště kaj poste per buso al Žehrov (la lasta haltejo).

Kontaktoj kaj pli da informoj

Jindřiška Drahotová

Sadová 745/36

CZ 293 01 Mladá Boleslav

Telefono: 420 720 652 320

drahotova@esperanto.cz

www.mlboleslav.cz/esperanto

www.evinatelier.cz

ttt paĝoj de la pensiono: [www.sweb.cz/espero.skokovy](http://www.sweb.cz/espero.skokovy)

telefono de la pensiono 420 326 789 505

## Esperantská literatura v češtině

Překlady z esperanta do češtiny se již několik let zabývá Jindřiška Drahotová z Mladé Boleslavi. Tiskem ve vlastním nákladu vydala knihy *Evropou a Asií na kole a s esperantem*, *Žili na Zemi* a *Člověk proti Babylonu* (Zamenhofův životopis). Další její překlady jako *Mise*, *No fakt, paní, věřte mi*, *Zápisky z Iránu*, *Vízum*, *Srdce se zelenou hvězdou*, *Moderní robinzoni*, *Dobrá naděje*, *Nebezpečný jazyk*, *Pohádky ze všech koutů světa*, *Chromozomy vraha* a několik čítanek si můžete stáhnout ze stránek <http://www.esperanto.wz.cz/> nebo <http://www.literatura.bucek.name/drahotova/drahotova.html>.

## JUBILEA SOLENAĜO EN SVITAVY 27.-29.9.2013

okaze de 5-jariĝo de Esperanto-Muzeo, 80-jariĝo de la loka klubo kaj de Urba Sanktvenceslaa solenaĵo (kun multaj distraĵoj).

Krom solena programo preparatas i.a. teatrospektaklo (R.U.R. de K. Čapek), dancvespero kun tombolo, inaŭguro de la ekspozicio „Pintoj de Eŭropo“ de Ján Vajs k.a. Ne maltrafu la okazon veni! Ebleco de tranokto (kondiĉojn vidu ĉe invito al Muzea nokto). Pliaj detaloj aperos en Starto 2013/2.

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz), L. Dvořáková tel. 604 377 616.

## Fervojista jarkonferenco en Ĉeĥio

Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio / Landa asocio de IFEF organizis sian 47-an jarkonferencon en la tagoj 26-a ĝis 28-a de oktobro 2012 en la nordmoravia urbo Šumperk, partoprenis pli ol trideko da membroj kaj gastoj.

Estis prezentita kaj akceptita raporto pri la agado, kies kulmino estis aktiva partopreno de dekkvinmembra delegacio en la 64-a IFK en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, kun multnombro da lumbildoj pri la aranĝo kaj la kongres-urbo mem, kaj kun filmo „175 jaroj de Germanaj Fervojoj“. Sekvis faka prelego de Ladislav Kovář.

En plia parto de la programo estis pritrakitaj kaj akceptitaj raportoj pri agado de terminara kaj fakprelega grupoj, kaj transdonitaj informoj de la kasisto pri mastrumado. Por subteni organizon de venontaj kongresoj de IFEF la ĉeestantoj pritraktis kaj unuanime akceptis fari proponon de libervola monofero por membroj de unuopaj landaj asocioj de IFEF, en minimuma alto de 1 eŭro al Kongresa fonduso de IFEF. Ĉiuj partoprenantaj membroj en la jarkonferenco surloke transdonis priskribitan monoferon al la kasisto de ĈeFEA. Post ricevo de monofero fare de aliaj membroj (kiujn oni informos perletere), la monsumo estos transdonita al la IFEF-kasisto en la 65-a IFEF-kongreso, en majo 2013.

En plia parto de la konferenco la ĉeestantoj partoprenis sabate antaŭtagmeze fakan ekskurson en entrepreno Pars Nova, a.k. en Šumperk, kie okazas plejparte adaptoj kaj riparoj de plej diversaj relveturiloj laŭ peto de la klientoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ por diversaj ekster-

landaj firmaoj kaj kompanioj.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis i.a. gvidata promenado tra historia centro de la urbo Šumperk kaj vizito en Urba Teatro, en akompano de sperta loka ĉiĉerono.

*Jindřich Tomášek*

### Rememoro al Hašek

*(fino el p. 18)*

Laŭ la aŭtoroj temas pri la ago de kunpacigo, tial estis elektitaj la lingvoj – de la hebrea, araba, ĉina – al ESPERANTO. *(el la gazeto PRÁVO / 7.1. 2013 – tradukis, modifis M. Turková)*

#### GRAVA RIMARKO:

Menciindas, ke financan donacon por realigi gravuradon de Esperanto-teksto liveris ĈEA-membroj Margit Turková kaj Václav Kaprál, al kiuj sendube apartenas nia danko! Okaze de la solenaĵo en Lipnice Max Kašparů iniciatis la ideon, kiun li pretas mem sponsori, nome provi samtempe en iu proksima loko de la Kapo XXII planti ankaŭ Esperantotilieton kun ĉeĥa-esperanta memortabulo omaĝe al Jaroslav Hašek. Se oni sukcesos tion aranĝi, des pli partopreno de esperantistoj estas dezirinda! Laŭ tempoblecoj kaj interesoj de ĉeestantoj oni povos komune viziti Muzeon de J. Hašek aŭ la burĝon Lipnice kun esperantlingva komentario.

Lipnice situas nurajn 10km for de la aŭtoŝoseo D1 Prago-Brno. Sendube temos pri interesa aranĝo, por kiu indos varbi eĉ viajn ŝoforantajn neesperantajn familianojn aŭ gemikojn por fari kune agrablan ekskurson! Aktualajn informojn pri konkreta horaro de la aranĝo bv. sekvi en Kalendaro de aranĝoj ĉe [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), aŭ telefone ĉe Pavla Dvořáková (774 942424) aŭ skribe ĉe [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz).



# KOMENIUS - ZAMENHOF

## La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

Necesas kunvoki la tutan homaron por konsiliĝi pri tiuj ĉi aferoj kaj komune adori Dion, cele akiri inspirojn por atingi ĝustajn solvojn de ĉiuj problemoj. Ni analizu tiujn ĉi aferojn tiel kompreneble al **ĉiuj** homoj, ke **ĉiu** nacio, eĉ **ĉiuj** ĝiaj anoj klare komprenu tiujn ĉi aferojn kaj kapablu klare primediti ilin.

Pri aferoj ne konataj aŭ ne multe konataj, neniu povas juĝi: se tamen iu juĝas, li estas blindigita kaj ĵetas sin mem, aliulojn, eĉ la aferojn mem en danĝeron. Tial ni unuarange strebu klarigi la pritraktotajn aferojn tiel, ke ĉiu perfekte komprenu ilin.»

Plue li instigas **ĉiujn** homojn pritrakti reformon de la aferoj homaj kaj samtempe difinas, kio estas la homaj aferoj: klereco, religio kaj gvidado de aferoj civitanaj (politiko). Per la esprimo «homaj aferoj» devas esti nomataj nur tiuj, kiuj celas nobligon de la homa naturo. En ĉiuj reciprokaj rilatoj necesas certa prudenteco, nomata gvidado de aferoj civitanaj – politiko. **Celo de politiko devas esti trankvilo de homaj animoj.**

Tial estas arto super artoj scii gvidi homon, reganton de ĉiuj aĵoj. Pri tio, kiel ni tiun ĉi arton ĝis nun estras, atestas disputoj, interbataloj, militoj... Ni analizu la kaŭzojn:

- homoj ne kapablas regi, nek lasi sin regi,
- homoj ne kapablas regi aliulojn, eĉ ne sin mem.

Ofte multaj nobluloj forgesas sian noblecon kaj entiriĝas en la plej nenie-

cajn aferojn. Por ili fariĝas plezuro regi kaj subpremi aliulojn. Multaj eĉ ne scias, kial ili regas, ofte opiniante, ke la mondo estas por ili, eldevigante tial obeemon perforte...

Kiel ne nobla estas la homa raso en reciproka rilato, t.e. en politiko: la bestoj vivas esence konkorde kun aliaj anoj de sia speco; sed ni – raciaj estaĵoj – konstante malakordiĝas... Abomena plezuro estas la militado. Se bestoj interbatalas, do kaŭze de nutraĵo kaj idoj. Sed niaj militoj fontas de honoravido aŭ kolerero aŭ malicemo aŭ alia spirita malsano.

Tio tuŝas eĉ netolereemon en religio: precipe dolorige estas, ke apenaŭ iu grupiĝo reciproke pli malamas sin kaj interbatalas, ol kristanoj... Dio estas ja nur **unu** kaj **ĉiuj** religioj devas unuarange rebrili en **ĉiujn** homajn korojn la Diajn radiojn de la ĝenerala konkordo...

Kiam eksplodis milito inter Anglujo kaj Nederlando, du landoj de reformacio, kaj en la jaron 1667 estis preparata la pakkonferenco, cele ĝian finiĝon, Komenius skribis por ĝi verketon «Anĝelo de paco» (Angelus pacis). Ĝi fariĝis dokumento pri liaj pensoj «irenikaj», t.e. celantaj al religia unueco kaj eterna paco, havanta konstantan aktualecon. Jen ĝiaj ĉefideoj:

«Vi montris, kion kapablas fari viaj fortoj, uzataj reciproke kontraŭ si – vi ambaŭ povas esti neniigitaj. Ekestis tempo montri, kion vi povos fari, se vi unuiĝos... Nur tiam finiĝos tiu ĉi milito feliĉe, se ĝi alportos al vi novan, pli firman amikecon...

Sed kiamaniere vi renovigos vian amikecon? Ĉu ne per tio, ke vi reciproke forgesos tion, kio estis? La saĝaj homoj ĉiam rigardis la plej bonan vojon al paco tiun, kiam ili forgesis la suferitajn maljustaĵojn.

Tio memkompreneble ne malebligas al vi, ke vi, unu al alia, ne riproĉu la malĝustajn agojn. Sed faru tion por sanigo de la aferoj ekde iliaj radikoj kaj por finigo de la maljustaĵoj, sed ne por abscesiĝo de la vundoj kaj kaŭzado de krimoj novaj...

Se la malakordon kaŭzas sistemo de reganta reĝimo, memoru: nek unu sistemo de regado estas per si mem malbona, se ĝi baziĝas je ordo kaj libereco. Dio montris tion en la naturo: abeloj vivas en monarkio, la formikoj en demokratio. Ambaŭ kun granda sukceso, se ne troviĝas iu, kiu kaŭzas kaoson...

Viajn disputojn povas pli bone pruvi aliuloj, ol vi mem, analoge kiel fumon pli bone vidas tiu, kiu staras pli malproksime, ol tiu, kiu estas per ĝi vualita... Unue estu prezentita la parolo de Dio, kiel normo, kaj nur poste la paroloj homaj, direktataj per la normo... Dion necesas obei unuarange kaj pli ol homojn...

Metu tial sur la pesilojn ne nur planojn homajn, sed eĉ planojn Diajn. Pripensadu ne nur tion, kion de vi postulas viaj reĝoj, sed eĉ tion, kion de vi postulas la reĝo de reĝoj. Kiel celon vi rigardu ne militon, sed pacon... La packontrakton skribu ne sur pergamenon, sed en viajn korojn...»

En 1668 li eldonis – kiel 77-jarulo, preskaŭ fine de sia vivo – la verkon «Unu necesa» (Unum necessarium). Ĝi fakte estas testamento de Komenius, resumanta liajn tutvivajn spertojn kaj strebadon serĉi kaj trovi medikamenton por forigo de homaj suferoj, malakordoj religiaj, politikaj, lernejoj, k.a.

Ununura medikamento estas: reveno al unueco, konkordo, racio, al la Dia elemento. Denove li instigas al paco,

alkonstruado de harmoni plena, trankvila vivo. Ne nur por certaj partoj de la socio, sed por **ĉiuj** homoj. Li prezentas al la tuta homaro por primedito:

«Se temas pri konservo de paco, kio necesas? La konkordo, tiu kunligilo de animoj, kune tenanta ĉiujn membrojn de la socio. Se ilia strebado malakorde diferencas, finiĝas sekureco. Ĉiu regno, en kiu homoj disiĝas kaj stariĝas kontraŭ si, velkas – diris Kristo, analoge kiel devas ruiniĝi la konstruaĵo, se estas difektitaj ligaĵoj de tegmentoj, muroj, kolonoj, fundamentoj...

Kio necesas por konservo de la konkordo? Ordo en personoj kaj agoj: ke iuj estu superranguloj, la aliaj subranguloj. Ĉiu devas scii, kia loko kaj tempo taŭgas por ĉiu ago. Necesas, ke ĉio okazadu libere, sen devigo, per racia pripensado, sen ruzo kaj sen aliŝajnigo. La arto regi baziĝas do je saĝeco, ne sur forto; je singardemo, ne sur insido... Ankaŭ besto ne toleras sovaĝan traktadon; se ĝi estas incitita, ĝi furioziĝas...

Tial al perfekta konkordo necesas digna egaleco aŭ digna regado aŭ digna obeado, ĉar la ĝenerala libereco estas gvidilo kaj lumo de liberaj agoj. Necesas agi jene: per libereco propra ne minaci liberecon de aliuloj. Krome, strebi iomete limigi liberecon propran, prospere liberecon de aliuloj. Tio estas unu el fontoj de harmonio.

La ĝenerala libereco bedaŭrinde ofte ŝanĝiĝas en sovaĝecon, kaŭzanta kaoson. Sed ĉu eĉ la plej bonaj aĵoj ofte ne renversiĝas en malon? Misuzadon de la libereco necesas eviti per leĝoj. Tiamaniere eblos atingi, ke la paco estos ĝenerala kaj daŭra.

*(daŭrigota)*

## Jubileoj

### Zdenka Novotná

Sabate la 9-an de februaro 2013 honora membrino de ĈEA Zdenka Novotná kaj alia membrino de la klubo Amikeco en Česká Třebová Marta Wacníková festis sian 80-jariĝon. Por siaj gratulantoj ambaŭ jubileantinoj preparis riĉan regalon de manĝetoj kaj programon. Zdenka Novotná nun estas prezidanto de la klubo Amikeco, komitatano de AEH kaj laboris ankaŭ kiel komitatano de IKUE.



Multe da tempo ŝi dediĉas al Esperantomovado kaj instruado de Esperanto en elementaj lernejoj. Kun infanoj ŝi ekskursas al eksterlando, partoprenas infanajn Esperanto-tagojn en Svitavy kaj prezentas scenojn, ne nur kun la infanoj, sed ankaŭ kun sia hundeto. Ni ĉiuj admiras ŝiajn agemon kaj inventemon. Ili restu kun ŝi ĝis 100-jariĝo! Grandan gratulon ni aldonas ankaŭ al Marta Wacníková!

*Libuše Dvořáková*

### Jana Cíhová-Hrdličková

La 14-an de aprilo 2013 atingos 90-jariĝon honora membrino de ĈEA Jana Cíhová-Hrdličková, konata en Esperantujo kiel tradukistino de literaturo, aŭtorino de propraj versoj kaj parolistino de esperantlingvaj elsendoj de Radio


Praha (1962-1967). Ŝia lasta laboro estas kontrolo de la romano *La Grafo de Monte Kristo* de A. Dumas tradukita de Daniel Moirand, kiu finas la antaŭparolon per dankoj: „Mi ŝuldas dankegon al sinjorino Jana Cíhová, el Černovice en Ĉeĥio. Ŝi bonvolis relegi la tutan tradukon kaj atentigi min pri fuŝaĵoj aŭ mistajpaĵoj. Ŝi atentege kaj senperfide plenumis sian taskon kaj tiamaniere evitigis al mi plurajn erarojn.“



*František Zajiček, Jaromír Jermář, Jana Cíhová*

### Pavel Polnický

La 10-a de aprilo 2013 estas tago de 70-jariĝo de Pavel Polnický, honora membro kaj eksa sekretario de ĈEA, peranto de esperantistaj gazetoj, sekretario de KELI, ekspedanto de *Dia Regno*, organizanto de pluraj KELI-kongresoj.



### Libuše Dvořáková



Vicprezidantino de ĈEA, prezidantino de Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy, organizanto de Infanaj Esperanto-tagoj kaj ĉefe iniciatinto kaj motoro de Esperanto-muzeo en Svitavy, Inĝ. Libuše Dvořáková atingas la 8-an de majo 2013 sian 60-jariĝon.

## Mortis Jaroslav Kašparec



*El Starto 4/1982, p. 22*

La 12-a numero de la periodaĵo *Turista* alportis informon pri forpaso de Jaroslav Kašparec, kiu mortis la 4-an de julio pasintjare en la aĝo de 64 jaroj. Li estis multjara turisto, funkciulo de KČT TJ Praga, li aktivis kiel instruitoro kaj poste ĉefo de turisma vojindikado en Praga distrikto. Ĉar li signife rolis ankaŭ en nia movado, pri kio pli junaj asocioj apenaŭ scias, mi volas dediĉi al li kelkajn vortojn. Li naskiĝis 11.6.1948. Kiam li esperantistiĝis, mi ne scias. Li laboris kiel murfarbisto ĉe Drahtav en Prago, tial li aktivis en fervojista sekcio de ĈEA. La sekcio sub gvido de Ing. Kovář estis vere aktiva kaj plenumis taskon de landa reprezentanto de ĉeĥaj esperantistoj-fervojistoj ĉe IFEF. Tamen iniciate de esperantisto L. Kolár aperis en okdekaj jaroj memstara landa filio de IFEF. Li eĉ kunvokis internacian kongreson – ŝajne eŭropan – kaj tiucele eĉ luis hotelon (tio poste entute fiaskis). Sekve tio naskis konfuzon inter ĉeĥaj fervojistoj kaj krome, tiu ĉi aktiveco ne

tute respondis al tiam validaj leĝoj. Tio kulminis en la fervojista konferenco en Česká Třebová 13. 12. 1980, kiam Ing. Kovář demisiis el la sekcia estreco kaj komitato de la sekcio ekstagnis. La komitato de ĈEA devis okupiĝi pri aperintaj problemoj kaj komisiis samideanon Kašparec provizore estri la sekcion kaj taskis lin prepari novan konferencon. Tiu efektiviĝis en Davle 19-20.2.1982. Oni elektis novan sekcio-komitaton kun J. Kašparec kiel estro. En oktobro 1984 demisiis pro sanproblemoj asocia sekretario Zd. Křimský kaj post kelkaj kandidatigoj fine la centra komitato de la asocio elektis en januaro 1985 J. Kašparec kiel novan sekretarion (parte salajrata). Por li la komitato decidiĝis, ĉar li sukcese solvis la problemojn de fervojista sekcio (kiun post li gvidis F. Strumínský). Tamen post certa tempo la asocia centro sub lia gvido komencis lami kaj ankaŭ lia dunganto ne tro subtenis tiun solvon. Li partoprenis en preparo de la V-a nacia Esperanto kongreso en Olomouc 12.-13.9. 1989, sed tie elektiĝis kiel sekretario K. Franc kaj la kunveno de fervojista sekcio elektis prezidanton J. Tomíšek. Tiuj ŝanĝoj malaktivigis s-anon Kašparec, kiu poste eksilentis en la movado kaj lia membreco post certa tempo finiĝis. Pli poste li pri la movado tute ne interesiĝis ĝis tiu grado, ke dum nia turisma renkontiĝo post la jaro 1989 li miris, ke la asocio ankoraŭ ekzistas kaj la lingvo funkcias. Malgraŭ tio en tiamaj kondiĉoj li grave helpis al ĝi, pro kio li meritas tiun ĉi rememoron. Laŭ atesto de Petr Chrdle li lastfoje aktivis ĉe IFEF-antaŭ-kongreso en Řevnice kiel ĉiĉerono tra Prago (2001).

*Vlastimil Kočvara*

# KALENDARO 2013

2013-02-22 Bazlerneja Balo en Bartošovice

2013-03-08/10 La 3-a BIERo en Vyškov

Info: [cxej@esperanto.cz](mailto:cxej@esperanto.cz)

2013-04-15/21 La 37-a Lingva Seminario en Skokovy

Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)

2013-04-18/21 La 8-a Sabla Printempo en Skokovy

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2013-04-27 Solenaĵo de Hašek en Lipnice

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2013-05-17/19 Komuna Renkontiĝo de Ĉeĥa kaj Slovaka IKUE-Sekcioj en Marianka (Slovakio),

Info: [m.svacek@seznam.cz](mailto:m.svacek@seznam.cz)

2013-05-18 Printempa Renkontiĝo en Jeseníky

Info: [sumperk@esperanto.cz](mailto:sumperk@esperanto.cz)

2013-06-08/09 Muzea Nokto en Svitavy

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2013-06-15 Infana Tago en Svitavy,

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2013-06-16 Renkontiĝo je Ĉantorio,

Info: [suchanekj@seznam.cz](mailto:suchanekj@seznam.cz)

2013-06-30/08-09 Somera Esperanto-Tendaro Lančov

Info: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

2013-08-03/10 KELI-Kongreso en Svitavy,

Info: [polnicky@quick.cz](mailto:polnicky@quick.cz)

2013-09-07 La 7-a Postferia Renkontiĝo en Vodňany,

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2012-09-13 Skolta solenaĵo kaj senvualigo de E-Monumento en Kopřivnice

Info: [khyvnar@seznam.cz](mailto:khyvnar@seznam.cz)

2013-09-27/29 Jubilea Solenaĵo en Svitavy,

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2013-10-09/13 La 2-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

Info: [verdastacio@gmail.com](mailto:verdastacio@gmail.com)

2013-10-25/28 ĈEA-Konferenco en Nymburk,

Info: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

2013-11-30 AnkRo en Písek,

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

## Migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“

**marto** - (ĝis 22.3.) VŠFS (Financa kaj administra altlernejo) en Most

**aprilo** (4.-26.4.) - Urba Biblioteko en Mladá Boleslav - 17.4. je la 16-a h diskuto por la publiko


**majo - junio** Urba Biblioteko Benešov

## Ni kondolencas



La 23-an de januaro 2013 forpasis kasisto de EK Česká Třebová **Svatopluk Ĉeĥ** 70-jara. Profesie li estis lokomotivestro. Li multe helpis al handikapitaj kaj blindaj esperantistoj.

**Marie Krátká** (1915-2013) forlasis nian mondon serene la 28-an de januaro 2013. Dum 50 jaroj aktiva membrino de EK Písek, ŝi agis en la komitato kaj kiel fer-



vora vojaĝemulino kunorganizis klubajn ekskursojn. Ŝi estis aprezata en urbe ankaŭ kiel tutviva volontulino en Ruĝa Kruco kaj subtenantino de kulturo. Ripete ŝi pridonas muzeojn en Písek kaj Vodňany per valoraj ekspoziciaĵoj, pro kio oni raportis pri ŝi ankaŭ en gazetaro, Ĉeĥa Radio kaj televido. Ĝis la plej lastaj semajnoj de la vivo ŝi gardis vere admirindan mensan freŝecon kaj bonhumoron. Kun amo daŭre rememoras membroj kaj geamikoj de la klubo „La Ponto“. Dum la adiaŭa meso eksonis ankaŭ esperantlingva Largo de Händel en prezento de M. Smyčka.

## 17-a Esperanto-konferenco de Alp-Adrio

**Izola - Slovenio 1-2 junio 2013**

Koncertoj, ĉiĉeronado tra la urbo, ekskurso Hrastovlje kaj Grad Socerb.

Info: Francka RIZNAR, Kopraska 32, 6310 Izola, Slovenio, [fani.riznar@gmail.com](mailto:fani.riznar@gmail.com).

<http://www.esperanto.it/eventi/2013/2013-05-ts-alpadria.pdf>.



## Jak platit svazu

**Pozor, změna účtu!**

**Nyní Fio banka Svitavy**

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

## Zájemci o časopisy

**Pozor na změnu telefonního čísla!**

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, [polnický@quick.cz](mailto:polnický@quick.cz). Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč  
**La Gazeto:** 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto:** 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

**Juna Amiko:** 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5  
**Literatura Foiro:** 1130,- Kč (\*750,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Femina:** 750,- Kč (\*500,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

### **Heroldo de Esperanto vychází, ale s potížemi**

V letošním roce vyšla jen dvě čísla, totiž č. 2 (celkově 2184) s označením *ĝis februaro* a číslo 5 (2188) s označením *ĝis majo*. Chybí vysvětlení, kam se poděla ostatní čísla, s jakými potížemi vydavatel zápasí a jak vidí budoucnost časopisu. Dokud se tyto věci nevyjasní, stahujeme HdE ze seznamu předplatného.

Periodikum Českého  
esperantského svazu - 44. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve  
svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel.  
517 332 339**

**Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2013**

-----  
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
7.5.2013**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

**Korekto:** S-ino Alena Temelová forpasis la 22-an de novembro 2012, ne en decembro, kiel aperis en la pasinta numero. Ni petas pardonon.

## Změny v distribuci Starta

Od letoška se členové ČES kromě kategorií C a P (ti nedostávají Starto) dělí na ty, kteří si předplatili náš svazový věstník v klasické papírové podobě a mají nárok i na podobu elektronickou, a na ty, kteří si zaplatili pouze elektronickou podobu (viz str. 105 Starto 4/2012 či membrotizoj na straně 2 každého čísla). Obě skupiny si mohou Starto v digitální formě stáhnout ze svazové internetové stránky pomocí hesla. Pokud máte příspěvky na rok 2013 uhrazeny, máte právo o heslo mailem požádat pokladníka svazu ing. Vratislava Hirše (vhirsx@email.cz). Odběratelům digitální formy pokladník mailem (má-li ho k dispozici) automaticky s každým číslem zašle webovou adresu i příslušné heslo.

### Máte zapláceno na rok 2013?

Toto číslo je zároveň **poslední** pro ty, kdo příspěvky na rok 2013 nezaplatili a neučiní tak ani do vydání dalšího čísla v červnu.

Děkujeme za pochopení a děkujeme všem, kteří poplatky za členství řádně a včas zaplatili.

## ĈEA venkis en konkurso

Lastmomente antaŭ finredakto ni eksciis, ke Ĉeĥa Esperanto-Asocio venkis en konkurso de la japana Fondaĵo CIGNO, destinita por Esperanto-asocioj de la landoj de la Eŭropa Unio, pro la plej bona publika informado pri Esperanto. Krom diplomo kaj japana suveniro la premio inkluzivas monan sumon 200.000 japanajn enojn, egalajn al 1.750 eŭroj kaj ĉ. 42.000 ĉeĥaj kronoj. Detaloj aperos sekvanumere.



Infanoj el Okříšky



Přerov, la 12-an de decembro 2012 -  
Kristnaska renkontiĝo



Kurso en Svitavy



Olomouc, la 15-an de decembro 2013 -  
Kristnaska renkontiĝo



Šumperk - renkontiĝo de esperantistoj



Prostějov, la 27-an de decembro -  
renkontiĝo okaze de Silvestro-tago

## El nia kluba vivo